



Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

majo (2) - '92

SAT-Kongreso en Litovio

La 65-a Kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazos inter 05.08.92.-15.08.92. en Kaunas, Litovio. Iom pli detale pri SAT vi vidu la rubrikon "Movada lernejo".

La kongreson povas partopreni ne nur la membroj de SAT, sed ankaŭ ĉiuj gastoj estas bonvenaj. La kongreso okazos en studenta urbeto de Litovia Agrikultura Akademio, kelkajn kilometrojn for de Kaunas. Alveno al la kongreso la 4-an de aŭgusto, forveturo la 15-an. La nombro de kongresanoj ne estas limigita. Partopreno nur portempa ne estas dezirinda.

Loĝado en studentaj domoj, en unu- kaj kelklitaj ĉambroj. (Komunaj kuirejoj, duŝejoj k.s.). Dezirantoj povas loĝi en hotelo en Kaunas laŭ aparta peto kaj pago. La manĝado estas orga-

nizita por ĉiuj en studenta manĝejo.

Aligo: Por aliĝi al la kongreso necesas pleniĝi apartan specialan aliĝilon, kion vi povas ricevi de la Organiza Komitato, aŭ rekte de SAT. La kotizoj (kongreskotizo + restadkostoj) estas aparte difinitaj por pagipovaj okci-

Kongresanoj el landoj "A" devas pagi la kotizojn (kongreskotizo inter 175-700 FRF, restadkostoj 1.500-2.500 FRF) al la poŝtkonto de SAT en Parizo, esperantistoj el landoj "B" povas pagi la kotizojn en rubloj (!) (kongreskotizo 35-120 RBL, restadkostoj 300-400 RBL) surloke post la alveno. Por partoprenantoj el eksa

Sovetio estas difinitaj aparte favoraj prezoj. La restadkostoj kovras la kostojn de 10 diurnoj (tag-noktoj) en studentaj domoj, trifoĵajn mangojn dum 10 tagoj, ekskursojn, kaj parton de la kultura programo. (informoj laŭ la suplemento de Sennaciulo nr. 1038.)

Pliajn detalojn, kaj aliĝilon petu ĉe SAT, aŭ rekte ĉe la Organiza Komitato:

Povilas Jegorovas,
233000 Kaunas-C,
pk. 167. Litovio.

Tel.: (ofica) +7-0127-208503

Fakso: +7-0127-204970 (aldonu "Esperanto")

Sennaciulo

EKOLOGIO - la verduloj kaj Esperanto
BOK - Alvoke al F
ATAL - Vi sciu ke...
ASOCIO DE ANARĤISTOJ - Esperanto-Klubo en SENICA (Slovakio) invit...
KOMUNISTOJ EN BU - religioj, ĝin...
MAUTHAUSEN - En Hungario pli ol 33 jarojn regis unu sola partio nomita Hungara Socialista Laborista Partio (HSLP), verkante iluziojn...
HUMURO - En Hungario pli ol 33 jarojn regis unu sola partio nomita Hungara Socialista Laborista Partio (HSLP), verkante iluziojn...
JUNAJ VOĈOJ - Pago de la SAT-Junulfojo

Por tutmonda civitismo

Ĉiu man, kaj aktoroj nun estas konceptataj nur naciistale: homo estas civitanino de sia nacio. Anstataŭ kvadrakel da jaroj, la movado lanĉita de Gary Davis por tutmonda civitismo...

dentaj landoj (landoj "A"), por aliaj landoj (landoj "B") kaj por la eks-Sovetiaj landoj (landoj "C").

Karaj legantoj,

plej unue sincerajn dankojn al viaj multaj laŭdaj, kaj kuragigaj leteroj, kiuj - sincere dirite - tre ofte redonis niajn energiojn kaj fidon por venki tiujn tasko-ondojn kaj malfacilaĵojn, kiuj aperis ĉe la startigo de EVENTOJ.

Nun, post 5 sukcesaj numeroj ni iom trankviliĝas. Abonantoj estas nun en 37 landoj, komencis la ekfluo de materialoj, unu post la alia anoncas sin novaj kotizperantoj, kaj tago post tago venas novaj abonpetoj.

Ni scias, ke ni havis plurajn erarojn. Ofte okazis lingvaj kaj preseraroj, kelkfoje estis forlasita la titolo de la concerna revuo el kiu ni represis artikolon, foj-foje ni hazardde ripetis la saman materialon en sinsekvaj numeroj, anstataŭ aŝiso aperis nur griza makulo, de numero al numero ŝanĝiĝis la paper-kvalito, ktp, ktp. Mi pardonpetas pro ili, kaj mi esperas, ke ankaŭ vi spertas (spertis jam) ilian pliboniĝon.

Eble ne ĉiuj scias, ke esperantistoj en Britio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio, Hungario kaj Polio ricevis nacilingvajn varbilojn, ja ni volis (kaj volas) ligi al la movado ankaŭ la ne-perfekte-parolantojn, la ĵusajn kurs-finintojn, kaj ĉefe la movade nespertulojn. Ni ricevis kelkajn protestleterojn pro la uzo de naciaj lingvoj, sed evidentiĝis,

ke nia decido estis ĝusta kaj efika.

Ĉirkaŭ 2/3-oj de leteroj esprimis malfidon al projekto lanĉi du-semajnan gazeton. Mi esperas, ke la ĝisnunaj kaj postaj numeroj konvinkis (-os) la dubulojn. Garantio por la daŭra apero estas - inter aliaj - ankaŭ la investita kapitalo, kio ebligus la eldonon de la gazeto por pli ol unu jaro, eĉ se ni havus nek unu abonanton...

Tre multaj ne konscias, do mi emfazas, ke ni NE estas posteuloj nek de Budapeŝta Informilo, nek de Hungara Informilo, nek de Hungara Vivo. Ni havas nenian juran rilaton al Hungara Esperanto-Asocio, HEA. (Eble iam ni rakontos pri la aferoj kaj rilatoj pli detale...)

Mi emfaze petas Vin, se vi volas sendi materialon al ni, NE sendu ĝin al HEA, ĉar tiuj ne alvenas al ni!

Multaj demandis pri aperigo de kompleta vojaĝkalendaro. En tiu ĉi jaro almenaŭ por some- ro ni jam ne faros tion, por la sekva(j) jaro(j) ni ankoraŭ ne havas tian planon.


Estis pluraj petoj pri anonctarifoj. Pro la multaj ceteroj taskoj ankoraŭ ni ne finpensis la aferon, - tio signifas, ke dume (ĝis alia informo) por movadaj aŭ esperanto-rilataj anoncoj ni ne postulas pagon! (Sed kompreneble tenas la rajton mallogiĝi aŭ ĝenerale ne akcepti ĝin.) La komercajn

reklamojn ni traktas aparte. Eventualajn ŝanĝojn ni kompreneble publikigos, kaj vi trovos ĝin en la concerna rubriko.

- La fak-aplikaj, ekonomiaj, komercaj temoj ŝajne estas inter la plej favore akceptataj. (Multaj menciis, ke abonas la gazeton ĝuste pro tiuj artikoloj.) Ni tre ĝojas, se vi helpus al ni, kaj sendus informojn, artikolojn pri tiu temo, kaj pri la ne-movada uzo de esperanto.

- Oni (=ni) faras gazeton, por ke la esperantistoj legu ĝin. Se io ne plaĉas al vi, ni volonte akceptas viajn kritikojn. Se EVENTOJ plaĉas al vi, ni tre ĝojas, se vi montrus la gazeton al viaj amikoj, konatoj, kaj helpus al ili aboni la gazeton. (Novaj abonantoj ricevas aŭtomate ankaŭ la ĝisnunajn numerojn - ĝis ilia elĉerpiĝo.) Ni estas konvinkitaj, ke konstanta ligilo kaj daŭra informricevo multe helpas al individuoj resti esperantisto, eĉ se momente li/ŝi ne havas tempon, monon, ktp. por vojaĝi al diversaj esperanto-arangoj.

Starante je via servo



László Szilvási

Teorio

Reago al la "Raŭma Manifesto"

El la demandoj starigitaj de Stefano Mac-Gill mi elevas nur unu, nome "kiomgrade vi mem kredas, ke Esperanto devus iĝi la dua lingvo por ĉiu?"

Tia slogano estus reala, se Esperanto havus miloble pli vastan popularecon, uzatecon, kaj se ĝi estus jam plene ellaborita por ĉiuj kampoj de la homa aktiveco. En komenca stadio, ĉar, bedaŭrinde, ni ĉiam ankoraŭ troviĝas tie, ni ne povas profituzi tiun sloganon, kies validecon mi, kompreneble, plenkredas, alie mi ja ne laborus por ĝi plenenergie. Tamen momente, ĉe nia evolufazo, ŝajnas al mi, por klare bildigi la situacion, kvazaŭ griza museto dezirus konkuri pri forto kun kolosa elefanto. Estas komike, ĉu ne?

Kion do ni povas aŭ devas fari nuntempe por eviti ridindecon, kaj malgraŭ ĉiuj obstakloj tamen antaŭenpuŝi la ĉaron de la Internacia Lingvo? Mi trovas plej prudente postuli por ĝi ĉie, kie montriĝas ebleco tiujn samajn rajtojn, kiujn posedas iu ajn fremda lingvo, t.e. **Esperanto estu konsiderata kiel unu el la ekzistantaj lingvoj.** Se oni rifuzas nin, ni povas protesti aludante pri la forfalinta jarcento kun multaj lingvaj valorajoj kaj menciante, ke diskriminacio kaj demokratio neniel harmoniigas. Unua paŝo por efektiviĝi la supran ĉef-

celon povas esti ĝenerala rekono de Esperanto kiel plenvolora lingvo. Tra ties agnosko kondukas vojo al la fina celo.

Due, plej elokvente ni povas argumenti per praktikaj ekzemploj. Tio signifas, ke ni devas ne paroli, sed uzi la lingvon por praktike valoraj celoj. Tio ne estas ia nova malkovro! Miloj da bonaj esperantistoj penis kaj penas prezenti la praktikan utilon de la Internacia Lingvo. Sed ni nombras ankoraŭ tro malmulte kaj nia forto estas loke disigita, ni simple ne havas do sufiĉan energion komenci totalan atakon. Al ĉiu nia iniciato povas aliĝi nur kelkaj centoj da adeptoj, apogantoj, sed tio evidente ne povas venigi okulfrapajn rezultojn. Jen tial mi rekomendis jam antaŭ pluraj jaroj elekti la ĉefajn, determinajn terenojn kaj koncentri nian forton al tiuj aktivecoj, ĉar mi estas profunde konvinkita, ke trarompinte unu- aŭ duloke la muron de l' silento ni certe povos plue progresi. Post longa meditado mi trovis unuarangaj agadkampoj: instruadon (ĉefe fremdlingvan instruadon) kaj turismon. Ĉi-terene ni havas jam konsiderindan forton kaj sperton, tamen ni devus paroli ne pri niaj propraj zorgoj, problemoj, sed - kaj ĉefe - doni ion komune redaktitan, kompilitan kaj valoran por la publiko ekstera. Ni devus ja peri, ne krei infirmaĵojn.


Kiel vi opinias pri tio?

Kruco

Urboj por vivi

Seminario pri urboplanado

- 18.07-24.07.1992. Berlino, Germanio
- ne pli ol 30 partoprenantoj
 - internacia partoprenantaro
 - senpera sperto de urboj en ŝanĝo
 - ekskursoj al Berlino kaj Potsdamo
 - seminaŭria programo en malnova kastelo
 - prelegoj, laborgrupoj, diskutoj pri la temo
 - ludoj, kradrostado, muziko en la parko



Kotizoj: baza kotizo 200 DEM. Krompago por pli ol 26-jaruloj, aŭ germanoj ne ordinaraĵaj membroj de GEJ: + 50 DEM. Rabato (por orienteŭropanoj, studentoj, lernantoj, senlaboruloj: - 50 DEM.

Berlina oficejo de Germana Esperanto-Junularo, Unter der Linden 38, DO-1086 Berlin, Germanio.

Gaston Waringhien (1901-1991)

En la komenco de februaro 1992. atingis min la dolora novaĵo, ke Profesoro Waringhien ne plu estas inter ni. Tiu ĉi granda bato al la tutmonda esperantistaro estos dolore sentata eĉ tie ĉi, je la fino de la mondo, en nia antipoda lando Nov-Zelando. Waringhien estis la plej granda esperantisto vivanta ĝis la fino de 1991. en Parizo. Aŭtoro de la Plena Ilustrita Vortaro kaj de la Plena Analiza Gramatiko, ambaŭ en kunlaboro de D-ro Kolomano Kalocsay en Budapeŝto, li helpas nin eĉ post la morto. Kun sia mirinda intuicio, Zamenhof donacis al la mondo la Fundamenton de la Internacia Lingvo kies unuecon certigis du grandaj disĉiploj: Waringhien kaj Kalocsay. Iliaj verkoj certigas la unuecon kaj malhelpas la disdialektigon de nia bela lingvo. Sed tio ne estas tuto. Ili estis ankaŭ talentaj verkistoj kaj inspiritaj poetoj kies verkoj servos kiel aŭtoritataj modeloj dum multaj jaroj. Speciala merito de Waringhien estas, ke li fondis nian esean literaturon per serio de universitatnivelaĵoj kun filozofia bazo, kies enhavo eĉ pli gravas ol la formo.

Kun Zamenhof ni povas nur diri: En Elizeo por vi ĉiam daŭros nia amo.

Jozefo Major, red. de Nov-Zelanda Esperantisto

Feliĉan Paskon?

Tiun ĉi bondeziron verŝajne vi neniam vidis kun demando-signo. Kial ni ne vidis en *Eventoj* pripaskajn artikolojn? Ne, ĉar Pasko en si mem estus malbona, sed ĉar ĝi ne estas *esperantista festo*, kaj kiel tio koncernu primovadan revuon? Eble kelkaj ofendiĝas pro tio, ĉar en *la individuo mem kaj en certa komunumo* tio, kiel multaj aliaj festoj kaj kutimoj, estas nedisigebla.

Se festi tiun, kial ne ankaŭ tiujn de ĉiuj eblaj aliaj mondkonceptoj, religioj. Fakte, kial ne? Certe, tio eblus (almenaŭ oni povas klopodi kontentigi ĉies interesojn), sed tio eble ne estas tasko de movada gazeto. Movada gazeto devus flegi festojn, valorojn *komunajn al ĉiu movadano*.

Sed ĉu la esperanto-movado havas sufiĉe da *propraj* kutimoj, propraj festoj? Ĉu estusinda pli feste festi certajn datrevenojn de la naskiĝtago de Zamenhof ĝis la unua kongreso kaj similaj mejloŝtonaj okazaĵoj? Eble estus grave remalkovri forgesitajn signifajn okazaĵojn kaj datrevene rememorante je ili oni eltirus saĝajn konkludojn por la nuntempo kaj estonto? Eble estus bone, sed tio ĝis nun ne estas tre farata. Kaj se jes, do averaĝa movadulo ne tiom entuziasme sekvas la kultadon de tiuspeca kulturo.

Aŭ ĉu kulti universalajn valorojn, kiel ekzemple paco, toleremo? Kiuj estas tiuj valoroj, ĉu iam de ĉiuj esperantistoj difinitaj? Tiuj kelkaj deklaroj kaj manifestoj, kiujn oni povus esplori, ĉu ili ne estis nur la opinioj de la subskribintoj? Sed kiel deklari ion en la nomo de ĉiuj esperantistoj?


Eble ni ne tro insistu krei *propran kvazaŭnacion*, sed ni fieru esti ano de niaj aliaj komunumoj (naciaj, religiaj, partiaj) kaj esperanto estus nur ilo, per kiu ni *fremduloj unu al la alia nur komunikas*? Ekzemple se *parto* de la esperantistaro, grupo de kristanaj esperantistoj faras ion okaze de kristana festo (ekzemple salutmesaĝas), tio estas jam aplikado de la lingvo, altranga celo de la movado, do loko por ĝi en movada revuo.

Sándor Hideg, Hungario

Tio estas nur unu el la eblaj opinioj, pri kio certe multaj ne konsentas. Al la temo ni ankoraŭ certe revenos, ekzemple kiam ni traktos la trajtojn de nia komunumo...

L.S.


Foto laŭ revuo Esperanto, No. 1034 (2)



Esperanto aplikata

Esperantligva QSL-karto por radioamatoroj

La hungara filio de *ILERA* (Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj) presis bel-aspektan trikoloran esperantlingvan konfirm-karton. (Ĝin sendas la radioamatoroj unu al la alia post sukcesaj radiokontaktoj por konfirmi ĝin ankaŭ skriboforme.)



La QSL-kartoj estas preseblaj ankaŭ por aliaj dezirantoj kun ĉies individuaj datumoj (voksigno, nomo, adreso, ktp). Minimuma mendeblo kvanto: 400 ekz., sume 23 NLG. La sumo malkreskas ĉe pli granda mendita kvanto. Pliaj informoj ĉe:

*s-ro László MATUSINKA,
H-2730 Albertirsa, Győzelem u. 2. Hungario*

Diina masaĝo

Fine de januaro '92. kunlaborante kun Internacia Instituto por Preventa Medicino el Tokio, IKoSo aranĝis sukcesan kurson de "Diina masaĝo" por 30 personoj. La instruisto estis s-ro Shigieru Hashimoto. Pluraj gazetoj skribis pri la kurso, la radio kaj televido dediĉis al ĝi grandan atenton.

IKS deziras ne nur daŭrigi la kunlaboron kun Internacia Instituto de Preventa Medicino en Tokio, sed ankaŭ invitas aliajn fakulojn pri natura medicino estonte kunlabori. Bonvenaj estas ankaŭ aliaj kunlabor-proponoj.

*Internacia Kultura Servo
Amruševa 5/1., HR-41000 Zagreb, Kroatio.*

Seula Esperanto-Kulturcentro

Antaŭnelonge estis fondita la Seula Esperanto-Kulturcentro, kies ĉefaj agadterenoj estas organizado de esperanto-kursoj, perado de diversaj revuoj, kaj vendado de esperantaj libroj.

SEK eldonis 12 paĝan katalogon de siaj ofertoj (en la korea lingvo), kiu listigas 279(!) E-librojn, krome diversajn glumarkojn kaj esperantajn blokon de esperantaj glumarkoj. Kontaktadreso:

*Seula Esperanto-Kulturcentro
Lee Jung-ke, direktoro
100-630 CPO Box 3047 Seulo, Koreio.
Tel.&Fakso: +82-2-7795936*

naĉia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo), direktoro de la komerca ĉambro de Meuse. Al li apartenas la tasko pruvi al sia prezidanto, ke esperanto taŭgas kaj utilas por internaciaj komercaj interŝanĝoj. La katalogo estas havebla kontraŭ 10 internaciaj respondkuponoj, aŭ samvaloraĵoj (= ĉ. 40 Frankoj), kaj estas bona ĉies helpo en ties diskonigo, kaj en skriba reago al la eldoninto. La katalogo petu ĉe:

*Chambre de Commerce de la Meuse
Parc Bradfer,
F-55000, Bar Le Duc, Francio.*

- Rumano serĉas partneron kiu povas oferti maŝinetojn, semajn k.a. por kulturaj 1-50 hektarojn da tero.

*Popa Craciun, Str. mehedinti 54-56
bl. D5/ap.312.,
RO-3400 Kolozsvár/Cluj.*

- Plantu persistajn plantidojn el Mez-Finnlanda plantidejo Akonen. Mendu ilin de Pentti Törmälä, Domargard, SF-06100 Porvoo, Suomio-Finnlando.

- Reprezentanto de "LIBROTUR" en Lublin serĉas kontaktojn kun esperantistaj kaj turismaj agentejoj en Hispanio por priturismaj celoj. Interesitaj bv. skribi al:

Vicdirektorino de Biuro Turistyczny Esperanciek *LIBROTUR,*

*ul. Krak.-Przedmieście 59/7,
PL-20-076 Lublin, Polio.*

Esperanto-Infofono refunkcii

Karaj Geamikoj, la Esperanto-Infofono startis kun granda sukceso. Bedaŭrinde ĝi estis interrompita dum kvar semajnoj, ĉar la firmao disponiginta al ni la telefonon - sen doni iun aju informon al ni de unu tago al la alia fermis sian servon. Ni nun instalas la infofonon en nia propra ejo.



Post tiu deviga paŭzo ni rekomencas la infofonon kun nova energio. Ni ricevis multajn pozitivajn kritikojn, sed ankaŭ kelkajn proponojn, kiel plibonigi la revuon. Do, ekde 24-a de aprilo vi denove povas aŭdi E-informojn en la telefonnumero 156-5434 (en Svisio).

*Dietrich M. Weidmann
prez. de Amikaro Esperantista
Bad Störgel, CH-9063 Stein, AR.*

(Rim: Voko al iu numero kosta 1 frankon minute. La servo direktiĝas ĉefe al Svislando, sed ankaŭ alilandanoj povas ĝin profiti. L.S.)




Se vi deziras trovi negoc-partnerojn kaj establi komercan kunlaboron kun firmaoj kaj entreprenoj en Respubliko Uzbekistano kaj Meza Azio en (plej diversaj) sferoj kiel fondo de komunaj entreprenoj, internacia turismo, importo, eksporto, ktp. turnu vin kun viaj ideoj kaj proponoj al:

*FIRMAO "ORIENTO"
Anatolo Ionesov, direktoro
pk. 76, 703000 Samarkando
Respubliko Uzbekistano*

Kudrometiistoj kaj malgrandaj fabrikoj por kunmetado de jam taglitaj eltondaĵoj estas serĉataj fare de produktistoj de vestoj kaj intimaj subvestoj.

Pliaj informoj ĉe:

*Esperanto-Komerca-Agado
EKA, kodo SP-001, C.P. 485,
I-34100 Trieste, Italio.
(laŭ "La Eta Gazeto, Nr. 5/92.)*



Komerca aplikado

Komerca katalogo el Meuse

La komerca kaj industria ĉambro de la urbo Meuse en Francio eldonis inventaron de la lokaj industri-produktoj la unuan-fojon jam en 1986.

En 1992. tiu ŝtatofico denove uzas la internacian lingvon. En la ĉi-jara katalogo pri turismo, ekonomio kaj industrio krom la kutima



franca, angla kaj germana lingvo apudas ankaŭ esperantaj tekstoj. (aparte atentu pri la paĝoj 16-19!)

La aperon de esperanto en la katalogo pri-zorgis F.X. Gilbert, estrarano de IKEF (Inter-

Movado

20 jaroj de IKS

Internacia Kultura Servo en Zagreb en la malfacila milita jaro festis 20 jarojn da laboro ekde la fondkunveno, okazinta dum la kunsido de Jugoslavia Esperanta Junulara Asocio, en Beograd en 1971. Pli ol du jardekoj da Pupteatra Internacia Festivalo, longa listo da Esperanto-eldonaĵoj, ekspozicioj, kulturaj kaj klerigaj aranĝoj, lanĉo de Zagreba Metodo de Esperanto-Instruado kaj dudeko da ties naci-lingvaj adaptotj... jen eta superrigardo de la laboro farita.


Post du jardekoj da laboro ĉe Internacia Kultura Servo, ĝia multjara direktoro Zlatko Tišljar adiaŭis de la posteno de direktoro kaj de laboro ĉe IKS.

Kun siaj dek enpostenigitaj oficistoj IKS daŭrigas la laboron pri kulturo kaj Esperanto kaj dankas al ĉiuj kunlaborantoj dise tra la mondo pro la longjara subteno kaj kunlaboro.

*Spomenka Štimec
Letero el Zagrebo, februaro/92.*

Sincerajn gratulojn, kaj multajn pliajn sukcesojn al IKS.

L.S.



25-a PIF

Kvankam estas iomete nenature ke la gepatroj estu pli junaj ol la infano, al IKS okazis ĝuste tio. En la jaro kiam IKS 20-jaraĝas ĝia plej granda infano - Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) - festas sian 25-an datrevenon. Necesas klarigi ke dum kvar jaroj antaŭ ol fondi IKS-on, IKS-anoj amato, kadre de Studenta Esperanto-Klubo organizis PIF.

Post multaj teruraĵoj kiuj trafis nian landon, post diversaj organizaj kaj krizaj momentoj kiujn havis IKS, post la provo priŝteli la nomon kaj la renomon de PIF (ĉar oni deziris organizi eksterlande t.n. "PIF-2") la problemoj iom post iom solviĝas. Granda apogo de urbo Zagreb kaj de Respubliko Kroatio jam nun certigas, ke PIF ĉi jare estos la unua granda kaj grava internacia kultura evento en la nova, sendependa kaj internacie rekonita ŝtato Kroatio. PIF okazos en Zagrebo de la 20-a ĝis la 25-a de junio. Ni kore invitas vin festi la jubileon de PIF!

Livija Kroflin

Kial do la UK ne okazas en Prago?

Aha...!

En 1990 la Sekretario de la Prezidanto de la Respubliko CSFR respondis al la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ke la prezidanto ne povas akcepti patronadon de "internacia konferenco" (t.e. UK en Prago '92).

En novembro 1991. ĈEA sciigis de raportisto de la ŝtata televido, interparolinta kun la prezidanto Václav Havel, ke tiu peto ne atingis lin, "likvidis" ĝin lia sekretario, ricevanta ĉiutage 300 leterojn. La prezidanto sciis surprize multon pri esperanto, kaj diris krome, ke li ne opinias la anglan lingvon la fina solvo, ke li konscias pri kontraŭstaro de germanoj, francoj kaj hispanoj, kaj ke foje iu internacia lingvo venkos (!) Kaj kial do klopodi elpensi novan internacian lingvon, se unu jam funkcias...? Tiu eldiro de la klera plej alta ŝtata reprezentanto - mi esperas - povas nin kuraĝigi.

*Jaroslav MARIK
Praha, CSFR*

**Antaŭkongreso de UK
en Prago!**

Ĉu partoprenos ankaŭ Vi?

Estrara deĵoro ĉe TEJO

En la Centra Oficejo de UEA laboras ne nur profesiaj esperantistoj, sed ankaŭ pluraj volontuloj, helpantoj.

Ankaŭ la ĉiutagajn operativajn aferojn de TEJO, la junulara sekcio de UEA, kutime plenumas volontulo. Pro la daŭra vigla agado en la junulara sfero kaj lige al tio pro la multaj farenadaĵoj, inter majo kaj julio ankaŭ estrarano de TEJO, Andrej Ananjin (el Moskvo, Rusio) plenumas trimonatan estraran deĵoron.



A. Ananjin estas unu el la plej konataj sovietiaj esperantistoj. Antaŭe li estis direktoro de JEC en Taŝtagol, eldonis la informilon "Eksciu, ke...", poste li iĝis la vicprezidanto de Sovetrespublikara Esperanto-Unio, SEU (landa organizo en SU post la malfondo de ASE), kaj ekde la Karlskoga IJK li partoprenas la laboron en la TEJO-estraro.

Do, por solvi eventualajn junularajn aferojn, vi skribu al TEJO: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (+31-10-)4361044, telefakso: (+31-10-)4361751.

Zagreba Esperanto-Ligo invitas vin partopreni

LITERATURA KONKURSO "IVO ROTKVIČ"

Ĝi entenas kvar branĉojn.

1. POEZIO

- Originala poemo aŭ kelkaj teme ligitaj poemoj.
- Tradukita poemo. Necesas aldoni la originalan tekston.
- Premioj: libroj

2. ETPROZO

- Rakonto, eseo, novelo, skizo, sceno originale verkita en maksimuma longo de kvincent (500) vortoj.
- Premioj: libroj

3. LIBRO-FORMA ELDONAĴO

- Por la plej bona libroforme eldonita verko en la jaro 1992, originala aŭ tradukita.
- Premio: mono

4. VIDEO-BENDO

- Aldona branĉo, ĉar multaj literaturaj verkoj, sed same aliaj esperantaĵoj trovas sian lokon sur video-rubandoj.
- Temo libera, prefere ligita al Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj, sistemo VHS.

Konkursi povas ĉiu esperantisto.

Kontribuajoj en unuopa branĉo povas esti maksimume tri, ne antaŭe publikigitaj en presa, radia aŭ televida formoj.

Necesas sendi tri kopiojn de la konkursa kontribuajo (branĉoj 1-3) al adreso de la sekretario de Zagreba Esperanto-Ligo (Marija Beloŝević, Sveti duh 130, 41000 Zagreb, Kroatio) menciante "por Literatura konkurso Ivo Rotkvič '92", provizita per pseŭdonimo (ĉifro). En aparta koverto estu indiko pri la plena persona nomo kaj adreso. Videokasedojn sendu nur en unu kopio.

Limdato: 15-a de novembro 1992. Por lastlastuloj validas la posta stampo sur la koverto montranta tiun daton.

Ĉiuj konkursaĵoj restos en la posedo de ZEL.

La premio-gajnintoj estos proklamitaj en kadro de la Zamenhofa festotago en decembro.

*Por la Komisiono de literaturaj konkursoj de Zagreba Esperanto-Ligo
Emilija Lapenna, juriano*

Arangoj

Karskoga Popola Altlernejo

Venonta kurso: 06.07-11.07.1992

La nomo Karskoga sonas konate ankaŭ en internaciaj medioj ne nur pro la tutjaraj esperanto-kursoj, sed ankaŭ pro landa esperanto-kongreso en 1990 kaj pro la IJK en 1991.


En la popolaltlernejo estas organizitaj oksemajnaj esperanto-kursoj, kvar foje en unu jaro. "... La instruado estas tute en esperanto, laŭ bildoj, strukturaj tekstoj, ktp. 20 lecionojn semajne plus 4 en lingvostudio (ne en LINGVO-Studio) studas la lernantoj, kiuj estas diversaj, sed ĉiuj pli ol 18 j. Nun eĉ partoprenas gimnazianoj, kiuj liberigis sin dum unu semestro por studi esperanton, ni havis studentojn eĉ el Ĉinio aŭ Japanio, ktp. ..."

La venontaj kursoj: Somera kurso: 06.07-11.07.1992, kurso en kvar niveloj, ses horoj tage. Vizito de muzeo Nobel, en vesperoj lum-bildoj, pupteatraĵo, komputilaj tradukprogramoj en esperanto. Kotizo: 1900 SEK + 50 SEK por lerniloj.

Oksemajnaj kursoj: por komencantoj — 24.08-23.10.1992 kaj 07.01-12.03.1993, por progresantoj — 02.11-18.12.1992 kaj 15.03-19.05.1993. Kotizo: 4.700 SEK + 150 SEK por lerniloj. Eksterlandanoj rajtas partopreni partempe (kaj pagi proporcie).

Pliaj detaloj ĉe:

Lars Forsman,
Karlskoga Popola Altlernejo,
fako 192, S-69124 Karlskoga, Svedio.



La 28-a en Anápolis!

La 28-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos inter la 12-a kaj 17-a de julio, en la urbo Anápolis (ĉefurbo de la ŝtato GOIÁS), situanta je 150 km-oj de Brasilia, la ĉefurbo de la lando. La kongreson partoprenos ĉ. 450 esperantistoj de la granda lando, kaj eksterlandanoj estas aparte bonvenaj. Pliaj informoj ĉe:

Brazila Esperanto-Ligo, Carlos Maria
Cx. Postal 03625, Brasilia-DF, 70084, Brazilio

Ĉu partopreni IJS-n?
Kial ne?

Internacia Junulara Renkontiĝo en Rumanio

19.07-25.07.1992. Kluĵo (Kolozsvár), Rumanio

La ekonomia kaoso ne timigas la organizantojn alfronti grandan taskon post multaj jaroj de agado en ombro. "Ni estas konvinkitaj, ke la efekto de nia renkontiĝo estos tiel granda, kiel ĝi havos la forton restarigi la esperanto-movadon en Rumanio kaj montri al la loĝantaro: esperanto estas viva kaj bela lingvo, ne nur ideo." – skribas la organizantoj.

La pritraktata temo estos: egalrajteco (politika, religia, generacia, seksa) krome okazos urborigardo, distra kaj muzika vespero.

Partoprenkotizo: por transpagipovaj landoj: 120 DEM, por nepagipovaj landoj 60 DEM pagenda ĉu en DEM, USD, aŭ RBL.

Limdato: 31-a de majo 1992.

Organizas: Asocio de Esperanto en Kluĵo
P.k. 1111, R-3400 Cluj-Napoca-1, Rumanio.

25-a Internacia Renkonto Naturamika (IREN)

15.07-24.07.1992 Abaliget, Hungario

Jam tradicia turista-feria renkonto, sub aŭspicio de s-ino Elizabeta PALLÓS.

Partoprenkotizo: laŭ kvin kategorioj de 1-lita somerdometo kun duŝo (7200 HUF = ĉ. 150 DEM) ĝis propra tendo (4200 HUF). Sen manĝoj je 2500 HUF malpli.

Limdato: 10-a de junio 1992.

Organiza adreso:

H-7601 Pécs, pk. 2. Hungario.



45-a de IKUE kaj 42-a de KELI

Komuna Kristana Kongreso

18.07-25.07.1992. Velence, Hungario

Partoprenkotizo: Landoj A/B: 280 NLG / 8000 HUF en hotelo, 230 NLG / 7000 HUF en studenthejmo (oklitaj ĉambroj), 140 NLG / 4000

HUF por infanoj, por studentoj.

Landoj B: eks-soclandoj (inkl. eks-GDR).

Landoj A: ĉiuj aliaj. Limdato: fino de majo.

Kongresejo: ÉDOSZ ŭdülő, Ország u. 23. H-

2481 Velence, Hungario. (Tel: +36-22-68224 (dum la kongreso!))

Koresponda adreso: s-ino Éva Farkas-Tatár, Dohány u. 36, H-1077 Budapeŝt, Hungario, Tel: +36-1-142 20 82.

Kongresa kasisto (aliĝu ĉe ŝi): s-ino Elizabeta Kaszab, Karinth ut 5., H-1117 Budapeŝt, Hungario. Tel: +36-1-186 06 06



Ĉu bicikli? Jes nature!

BEMI-Karavano '92: Sankt-Peterburgo Kaunas


"Ankaŭ ĉi-jare okazos bicikla karavano de BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia). En ĉi tiu jaro la BEMI-karavano biciklos de Sankt Peterburgo (Ruslando) al Kaunas (Litovio). Ni komencos nian karavanon tuj post la fama SEJT (Sovetia Esperanto-Junulara Tendaro) en St. Peterburgo kaj biciklos al la SAT-kongreso (Sennacieca Asocio Tutmonda) en Kaunas.

En 24 tagoj ni biciklos 1.500 kilometrojn, do restos sufiĉe da tempo por viziti urbojn kaj renkonti lokajn esperantistojn. En ĉiuj de la tri ĉefurboj (Tallinn, Riga kaj Vilnius) ni restos unu tutan tagon por viziti la urbon, libertempe, ripari la biciklojn, longe dormi, ripozi k.t.p. La tagaj etapoj estos inter 60 kaj 100 kilometroj.

La karavano estas organizita laŭ la kutima sistemo: ni memzorgos kaj komune pagos la komunajn elspezojn (manĝado k.t.p.). Loĝos ĉe geesperantistoj aŭ tendumos ĉe kamparanoj, do la kotizoj estos ege malmultaj. Ni biciklos preskaŭ nur sur asfaltitaj vojoj kaj preskaŭ ĉiam evitos la plej grandajn vojojn. Eblas komenci la karavanon ne nur en St. Peterburgo."

Se vi deziras partopreni aŭ havas demandojn, bonvolu kontakti:

Ivo Miesen, H. Cleyndertweg 41
NL-1025 DG Amsterdam, Nederlando
Tel.: +31-20-6360429



Intensa Pedagogia-Metodika Kurso de ILEI

1992. aŭgusto 23-30.

Antaŭaj tri metodikaj kursoj de ILEI/UEA estis organizataj de KCE en La Chaux-de-Fonds. Pasintjare ni ne sukcesis realigi tian kurson en la naskiĝurbo de la unua instruisto de la Internacia Lingvo, sed ni nepre deziras venigi la instruistojn kaj instruantojn de Esperanto al Bjalistoko kaj Monki, por prepari ilin al gvidado de internaciaj Esperanto-kursoj.

Programo: krom la metodika, faka programo, kiun ĉiutage gvidos ILEI rajtigitoj, okazos:

Ekskurso al Tykocin, Bohoniki kaj Bjalistoko, ("Kultura diverseco de la regiono"), teatra spektaklo en plenumo de Barbara Lukaszewska el Bjalistoko, muzika koncerto.

Kotizoj: 140 DEM (ĝis 92.07.31.), 170 DEM (poste kaj surloke).

Loko: Sport- kaj ripoz-centro en Monki (40 km de Bjalistoko) 2-3 litaj ĉambroj, duŝoj kaj necesejoj etaĝkomunaj.

Aliĝu ĉe:

Esperanto-Centro Ludoviko Zamenhof
S.P. 67, PL-15-950 Bialystok
Fax: +48-85-20255

Lingvo

Iom pri "ANKAŬ"

Ĉi tiu eta vorto kaŭzis jam tiom da konfuzoj, miskomprenoj, ke certe estas interese rigardi ĝin iom pli proksime. Serĉi la fontojn de la eraroj, kiujn oni ĉiupaŝe renkontas en Esperantujo.

Zamenhof, prave aŭ malprave, opiniis necesa, ke certaj adverboj havu nevarian finaĵon, kiu ĉe la finaĵa pluformado povas esti konservata, do ne elfali kiel la ordinaraĵoj. Tion li ŝovis per la elpenso de finaĵo AŬ, kion oni trovas ankaŭ en "ankaŭ". Zamenhof nomis ĝin "neŭtrala sed difinita finiĝo".

"Ankaŭ" estas emfaza adverbo, signifanta, ke al jam donita ago aŭ stato aldoniĝas alia, tute komparebla (Signifas: "ne nur ... sed ankaŭ", "kiel ... tiel ankaŭ").

La regulo pri ĉi tiu adverbo en la Plena Analiza Gramatiko troviĝas en la 273-a paragrafo sub titolo *Ligita vortordo*. Ĝi estas pritraktita kune kun la vorteto EĈ, jene: **La adverbon ANKAŬ kaj EĈ oni metu antaŭ la vorton, kiun ili senpere rilatas. De ilia ĝusta loko, nome, dependas la preciza senco de la frazo.**

Plena Ilustrita Vortaro prezentas la vorton "ankaŭ" kun stelo (signifas fundamenta) jene: *adverbo, signifanta "plie", "krome", "tiel same". Regule ĝi estas metata senpere antaŭ la vorto, kiun oni volas emfazi.*

Ĉi tiuj enkondukaj vortoj estas sufiĉe klaraj, sed la ekzemplo-frazoj kiuj sekvas ilin, malpli... PAG: *Ŝi dancis hieraŭ en la korto.* Sekvas interrompado de la frazo pere de *ankaŭ* jene: *ankaŭ ŝi* krom aliaj; *ankaŭ dancis* krom kanti, ktp; *ankaŭ hieraŭ* krom hodiaŭ; *ankaŭ en la korto* krom en la ĉambro.

PIV donas multajn frazojn, cititajn el la verkaro de Zamenhof. Estiminda ideo kun dubinda rezulto. Oni forgesas mencii, ke ili plejparte apartenas al la unua, eksperimenta periodo, kaj Zamenhof rajtis uzi "ankaŭ" laŭ la poeta, verkista libereco laŭplaĉe. Kiam temas pri klara klarigo, Zamenhof ĉiam precize konceptas la regulojn, kiujn li modeste nomas proponoj.

La ĉefa problemo estas kion signifas "antaŭ la vorton". En la ekzemplo de PAG estas klare videbla, ke ĝi la esprimon *en la korto* konsideras UNU vorto. Sed forgesas mencii tion! La saman kulpon faris PIV. La prepozicio, artikolo kaj adjektivo(j) tiel strikte apartenas al la "koncerna" vorto, ke eĉ ANKAŬ ne povas dividi ilin. Ĉi tiun vorto-grupon mi preferas nomi UNUO anstataŭ VORTO. Tuj estus multe pli klara la afero.

Zamenhof permesas meti "ankaŭ" post personaj pronomoj, sed sole post ili. Tamen mi proponas tion tute neglekti, por eviti escepton en esperanto, kaj ankaŭ eviti la miskomprenon de *ŝi ankaŭ dancis*. Ĉiuj esperantistoj parolu klare! Ankaŭ je ANKAŬ!

Klara Harrison
The Worker Esperantist, nov-dec. 91

Esperanto en radio

Svisa Radio Internacia ĉesis disaŭdigi Esperanto-elsendojn ekde la somera tempo (1992-03-29) pro financaj kaŭzoj.

La Esperanto-elsendoj de Svisa Radio Internacia komencis vintre 1946/47. En aprilo 1992 malaperis Esperanto sur la mallongondoj de Svisa Radio Internacia. La rolo de SRI ŝanĝiĝas en ŝanĝanta mondo. Aperas novaj disaŭdigaj sistemoj. La kurtondon pli kaj pli anstataŭas la ultrakurtondo; precipe la satelitoj, ek-

zemple la ASTRA-sistemo, pro tio la respondeculoj de SRI estas devigitaj ŝanĝi la tutan koncepton. La plej grava tasko de SRI estas estonte servi al la svisoj, vivantaj en eksterlando, laŭ konstitucio ilia patrujo devas atingi ilin per radio-ondoj.

En preparo estas programoj sur kasedoj, detaloj ankoraŭ ne estas konataj.

Eventualaj pliaj informoj ĉe: Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

Radio Aŭstria Internacia ne ŝanĝis la elsendotempojn (dimanche 04.05, 13.05

UTC). La programo konsistas el: Semajna komentario, intervjuoj politikaj kaj ekonomiaj, aŭstria kulturraporto, felietonoj, leterkasto kaj Esperanto-kantoj. La nova programkajero (29.03. - 27.09.1992) estas senpage ricevebla de Radio Aŭstria Internacia, Esperanto-Redakcio: A-1136 Vieno, Aŭstrio.

Pro manko de la Semajna komentario je la 5-a de aprilo 1992, Radio Aŭstria Internacia disaŭdigis du felietonojn:

- 1a pri la Greka gastejeto en Vieno, verkita de d-ro Karl BECKMANN;

- 2a pri la Danuba Virineto de la Johann STRAUSS-jaro, verkita de d-ro Karl BECKMANN. Kopioj de la manuskriptoj estas ankaŭ senpage haveblaj.

Pola Radio ŝanĝis ĉi-jare la elsendotempojn de UTC vintra 14.30 kaj 21.30 al somera 13.30 kaj 20.30 UTC. Sur la nova programinformilo de Pola Radio estas ne la ĝusta somera elsendotempo! Do atentu, ke Pola Radio elsendas laŭ somera mezeŭropa tempo je la 15.30 h kaj 22.30 h ĉiutage. La frekvencojn vi povas preni el la nova programinformilo ricevebla senpage de Pola Radio, Esperanto-Redakcio, poŝtkasto 46, PL-00-950 Varsovio/Warszawa, Pollando.

Bonan akcepton deziras al vi
via Radiolejo el Aŭstrio

Recenzoj

Ernesto Drezen: Historio de la Mondlingvo

Eldonis eldonejo *Progreso* la faman klasikan verkon de E.Drezen, kiu aperis unuafoje en 1928-30 kaj siatempe furoris. Tamen neniam tiu teksto ricevis redaktan poluron; malgraŭ sia fameco la libro enhavis nekontrolitajn faktojn kaj erarojn ofte ripetitajn de postaj aŭtoroj.

La nuna eldono estas la unua, zorge kontrolita kaj redaktita. La redaktoro d-ro Sergeo Kuznecov verkis ampleksan antaŭparolon pri Drezen, lia libro kaj lia epoko, kaj provizis la verkon per detalaj komentoj kaj indeksoj. Kiel speciala aldono al la libro aperas la reprodukto de la unua versio de la verko — tiu de 1911.

La libro, lukse eldonita, ilustrita, meritas la jubileon de la centjara datreveno de Ernesto Drezen (1892-1937). Prizorgis, mendis ĝin ĉe la eldonejo nova firmao *Ruhtenia*, kiu per tio prezentas sin al la esperanta mondo.

Ĝi estas universala komerca entrepreno kun speciala intereso pri Orient-Okcidentaj interrilatoj.

Prezo (en 1992): 30 USD. Rabatoj: po 10 ekz. 33%, por ekssoclandanoj po 4 ekz. 25%.

Kompanio *Ruhtenia*
111524 Moskvo, alja. 15, Rusio.
Fakso: (7095) 292 6511, interling 7790,
telekso: 411 700, interling 7790

Vina



Seminario

Vina Seminario ankaŭ ĉi-jare!

La seminario okazos inter la 1-a kaj 4-a de oktobro ĉe la urbeto Bzenec, fama folkloro centro de suda Moravio.

- Dum la seminario okazos prelegoj pri vinproduktado, pri diversaj varioj, pri la ĝusta maniero de vingustumado, (kompreneble kun multaj praktikaj ekzercoj...!) vizito de vinproduktejo kaj barokaj vinkeloj, ktp.

- La aranĝo estas destinita por ĉiuj interesiĝantoj sendepende de la aĝo, kondiĉo estas nur ŝati la vinon, kaj la emo por amuziĝi.

- Pliaj informoj ĉe:

ĈEJ, Jana Burianová,
Rennská 35,
CS-639 00 Brno, CSFR.

Mallonge

Ŝanĝiĝis la telefonnumero de ILTIS-eldonejo (eldonanta la revuon ILTIS-Forumo). Jen la nova telefon- kaj telefakso: (+49-681-816713. (Adreso restis la sama: DW-6670 St. Ingbert, Pf. 1530.)

Komunikajo 13 de Ontaria Esperanto-Asocio: Semajnfina renkontiĝoj okazos inter 12-14 de junio en Porso, 28-30 de aŭgusto en Otavo. La kvara Ontaria Esperanto Kongreso okazos ĉe Ŭaterlo Universitato, inter 15-18 de majo. Pliaj informoj:

OEA, Manuela Kampanjaa
Pk. 80. Jilio B, Otavo On, KIP 6C3, Kanado.

La 36-a Internacia Seminario de GEJ okazos en Borgwedel (Nordgermanio), inter 27.12.92. kaj 02.01.93. Aliĝilon (kun 1 IRK) petu ĉe: GEJ, IS-administrejo, Unter den Linden 36-38. DO-1086 Berlin, Germanio.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo organizas la "Duajn Esperanto Labortagojn" inter la 4-a kaj 12-a de oktobro en u. Torrox (Malága), en la feriejo "Cristo Reg".

- Agadoj: 04-09.10.92. eksursoj tra la "Costa del Sol", vizito de la Foiroj (Torrox kaj Nerja), vizito de turismaj lokoj de la regioneto, plaĝoj kaj amuzoj, 10-11-12 (ĝis la tagmezo) debatoj pri "La esperantigo de la socio" kaj asambleoj.

Pliaj informoj ĉe:

pk. 864, E-29080 Malága, Hispanio.

IpI reaperos

La "Informilo por Interlingvistoj" (IpI), eldonita de CED, reaperos sub redakto de d-ro Detlev Blanke.

Ryszard Rokicki - dankojn al li - redaktis 21 kajerojn (1983-1990). IpI celas peri informojn pri la plej gravaj interlingvistikaj aranĝoj, publikaĵoj, iniciatoj kaj planoj. Ĝi aperos laŭbezone kaj en modesta aspekta formo. Interesiĝantoj mendu ĝin ĉe UEA. Kontribuantoj skribu al al redaktoro. (Otto-Nagel-Str. 110, Pk. 113-05, DO-1141 Berlin, Germanio.)

2-a Esperantista Rendevuo en Hispanio

La komuna renkontiĝo de 19 lokaj societoj kaj asocioj okazos la 7-an de junio, en Vila-Rodona (Tarragona). Okazos inaŭguro de "Esperanto-strato" fare de lokaj aŭtoritatoj, pluraj prelegoj, informado pri la 78-a UK en Valencio, kaj multaj aliaj.

Petu pliajn informojn ĉe:

Barcelona Esperanto-Centro,
Carreras Candi 34-36,
E-08028 Barcelono, Hispanio.



Estimata s-ro László Szilvási,

Internacia esperantista familio de bulgarino kaj belarusio skribas al vi. Mia edzo estas tradukisto en kaj el 7 lingvoj. Mi estas universitata instruistino pri matematiko.

Nia amiko, la dramaturgo Ljubomir Trifončovski montris al ni tri numerojn de via revuo "EVENTOJ". La revuo tre plaĉas al ni. Ni gratulas vin kaj deziras al vi pluan sukceson.

Tre forta estas nia deziro regule ricevi vian revuon. Ni povus uzi ĝin ne nur por nia familio, sed ankaŭ en la laboro de nia E-societo "Mistera lumo" kaj de la "Literatura Rondo" (kies membro mi estas).

Tamen! Tamen la abonotizo estas tro alta por ni. Mi vivis dum 8 jaroj en Budapeŝto (mi finis tie lernejon kaj poste studis en la Universitato ELTE) kaj sufiĉe bone konas la situacion en Hungario. Mi scias, ke la socialismo ne sukcesis tiel multe detrui la vivon en Hungario, kiel en Bulgario kaj, ke hungaroj pli rapide paŝas laŭ la korekta direkto al la estonteco. Ni ankoraŭ troviĝas inter la ruinoj kaj ĉiu tage preĝas "travivi ĝis morgaŭ", t.e. ne perdi sian laboron kaj sukcesi satigi la familion apenaŭ ĝis morgaŭ.

Do, mi petas vin akcepti kiel abonotizo por via revuo kolekton de ĉiuj ĝis nun eldonitaj bulgaraj E-poŝtmarkoj kaj kelkajn E-glu-markojn. Mi tre bone komprenas, ke tiu estus tre simbola kotizo kaj se vi abonos fakte nin, ni restos devigataj al vi. Tiu signifas, ke ni provos poste ankaŭ kontribui al la revuo per artikoloj. Honeste dirite, ĝis nun mi skribis kelkajn eseojn nur por "Bulgara Esperantisto" kaj mia edzo skribis artikolon por "Debrecena Bulteno". Tamen, se vi "suflorus" al ni temon, kiu estos interesa por "EVENTOJ", ni provos skribi pri ĝi.

Plena nomo kaj adreso, Bulgario

Karaj legantoj,
ĉiutage ni ricevas plurajn similajn leterojn. Ni ĝojas, ke la gazeto plaĉas al la homoj, sed malĝojas, ke al ĉiuj ni ne povas sendi ĝin senpage. Se vi volas iom helpi la esperantan informfluejon kaj la movadon en netranspagipovaj landoj, ni ĝoje akceptus viajn donac-abonojn. La donacajn abonotizojn vi povas sendi al vialanda kotizperanto. Multajn dankojn al Vi ankaŭ en la nomo de subtenotoj.

László Szilvási

Kara László kaj kunlaborantoj!
Mi vidas ke via laboro estas serioza kaj bona. Mi neniam abonis al primovadaj revuoj, sed legante EVENTOJ-0001 ŝanĝiĝis mia opinio pri ilia ĝisnuna kvalito kaj ilia utilo.

Arnald Massanas i Daunis, Hispanio

"Kun plezuro ni legis la unuan numeron de EVENTOJ. Brilan sukceson!"

Jozefo Major, Nov-Zelando

Estimata Redaktoro,
Nome de la Skolta Esperanto-Ligo mi deziras danki al vi pri la detaloj de la skoltaj tendaroj sur la paĝoj 4 kaj 5 de EVENTOJ, aprilo (2), 1992.

Samtempe mi devus komenti pri la redaktoraj notoj:

Dum la nuna malklara situacio el la orient-eŭropaj landoj kun la renovigado de la skoltaj asocioj, kaj ankaŭ ĉar la celoj de la skolta movado estas krei amikecon inter la diversaj nacioj, la Skolta E-Ligo bonvenigas ĉiuspecajn junularajn individuojn kaj grupojn. (Bonvolu akcepti, ke SEL ne estas mem oficiala skolta asocio - ĝi estas interesgrupo por geskoltoj.)

Sincere via

David H. Withey
ĝenerala sekretario de SEL

"... surprize mi ricevis vian novan publikaĵon EVENTOJ, kies lanĉo estas mia opinio vera evento en la tutmonda E-movado. Al mi tre plaĉas la bela grafika prezento, lerta redaktado, la promesata aperitimo, kaj la riĉa (praktike uzebla!!!) enhavo. Gratulon al Vi!..."

Anatolo Ionesov, Uzbekistano

Jus aperis en Esperanto:

Godfried Bomans: **PIETER BAS**

Godfried Bomans (1913-1971) estas unu el la plej popularaj nederlandaj aŭtoroj, kun tre specia humura stilo. Pieter Bas estis lia literatura debuto (1937), kaj subtile parodi-

as la agadon de politikistoj. Originalaj ilustraĵoj de Harry Prenen. 208 paĝoj, 21 NLG. Haveblas ĉe la eldoninto (Libroservo de FLE, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem, Nederlando) kaj baldaŭ ankaŭ ĉe UEA.

De la sama aŭtoro aperis en Esperanto:

- Sango kaj amo
- Erik, aŭ la malgranda insektlibro.

FONDITA EN 1937

NOVA SERIO, N-RO 457

NOVEMBRO 1990



LABORISTA ESPERANTO-ASOCIO
67 AVENUE GAMBETTA • 75020 PARIS • TEL. 47.97.87.05
ORGANE MENSUEL DES TRAVAILLEURS ESPERANTISTES DES PAYS DE LANGUE FRANÇAISE

EVENTOJ, esperantó nyelvű információs lap.
Nyit. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.
A kiadó és a szerkesztőség címe:
1675 Budapest, pf. 87. Tel: 1288258.
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.
Készült az M & M nyomdában.
H-1161 Budapest, Becsényi u. 10.
EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio,
kaj LINGVO-Studio, Budapest.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
Teknike redaktas Sándor Hideg.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

Anoncetoj

Se vi posedas aŭ ŝatas la katojn (kaj ordinajn kaj rasajn), se vi kolektas-prikatajn bildkartojn, librojn aŭ eĉ humuraĵojn, aŭ se vi nur interesiĝas, kontaktu aliajn saminteresulojn!

Rondo Kato (registrata E-grupo),

Pentti Törmälä

Työttömyysrunot, Karkukengän 90.061

Tuomarinkartano,

SF-06100, Porvoo, Suomio-Finnlando.

"Mi kolektas poemojn pri senlaboreco por poema verko (precipe la finna, sed taŭgas ankaŭ la tradukoj). Ĉu vi povas helpi al mi? Ĉi tie la adreso por tio:

Pentti Törmälä

adreso supre

Ĉu vi volas renkonti kastel-spiritojn? Montkastela Renkontiĝo de Aŭstria Esperanto-Junularo en la kastelo Stibickhofen, Trofaiack, 08.10.92.-11.10.92.

Pliaj informoj:

AEJ, Pk. 804, A-8011 Graz, Aŭstrio

Se dum via restado en Britio ĉi-somere vi vizitos ankaŭ la grandan festivalon "Ĝarden'-Festival'-Kimrio", kontaktu la esperanto-dejoranton John Dickinson.

Esperanto-domo,

4 Casaba Terrace Llanfoist,

Abergavenny, Gwent NP7 9NR, Britio

Tel.: +44-873-2731

Se vi volas havi fotokopion de la lingva studo de d-ro Mihály Molnár pri la demando "Ĉu mallongondo aŭ kurtondo?" - petu ĝin ĉe la Esperanto-Fako de Radio Vieno.

ORF, A-1136 Wien, Aŭstrio.

UK Vieno - Unuafoje internacia orkestro

Ni ŝatas ludi Mozart simfonion dum la UK en Vieno kaj serĉas ankoraŭ orkestranojn: ĉefe violonojn, aldoin, kaj violonĉelojn, krome traversflutojn, obojojn, klarinetojn, fagotojn.

Skribu al: Internacia orkestro ĉe

Thomas Kleemann

Bahnhofstr. 95. DW-6904, Eppelheim, Germanio.

La helpo pere de la Tempa Trako. Fama naturkuracmetodo, jam konata en Esperantujo. La Tempa Trako estas simbolo de la spino. Gravas malstreĉigi sian spinon por reguligi multe da korpaj kaj psikaj problemoj. Doni la helpon pere de la Tempa Trako instruas:

Margarete Bettmann

ENA estraranino -kasistino- Pitzlergasse 6, D-W-5160 Düren

Telefono: 0049-2421-85511

Bv. ne heziti skribi por informo kaj ebla renkontiĝo dum iuj Esperantaj eventoj, kiuj eĉ arangeblas per vi.

Movada lernejo

SAT estas la mallongigo de *Sannacieca Asocio Tutmonda*. Ĝi estas internacia esperanto organizo, ne-ligita (=paralela) al UEA.

SAT estas ne-neŭtrala organizo, ĝi estas ligita al la laborista movado.

Celoj de SAT estas

- utiligi praktike la internacian lingvon esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda;

- kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homa solidaro;

- lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj la plej perfektaj el tiel nomataj internaciistoj;

- servi kiel peranto ĉe interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT;

- peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de SAT.

SAT, ne estante partipolitka, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj, per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruistoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Adreso de SAT:

67 ave. Gambetta,

F-75020 Paris, Francio.

Telefono: 47.97.87.05

(laŭ ĈEJ-Cirkulero 5/1990.)

- Paralele al SAT funkcias la organizo SAT-Amikaro (tute memstara, sed la adreso estas la sama).

-SAT-Amikaro (kun SAT) funkciigas libroservon (Bernard Schneider, 38 ave. de la Republique, F-94320 Thiais, Francio), korespondan servon, kaj funkciigas la servon de Amikeca Reto. Ĝi estas kajero kun ĉ. 300 adresoj el pli ol 30 landoj, kiu helpas al esperantistoj trovi pli proksimajn rilatojn unu al la alia (sed ĝi ne estas senpaga tranoktebleco).

Ilustrajo laŭ la revuo SAT-Amikaro No. 466.

47-A SAT-AMIKARA KONGRESO



Korespondi deziras

Mi volas korespondi kun hungaraj esperantistoj, eĉ -inoj, aŭ kun germanoj, aŭstroj, ĉinoj, francoj, italoj pri diversaj temoj, esperanto, historio. Mi kolektas pm, bk, div. diafilmojn, flagetojn. Mi interesiĝas pri esperanto, sporto, muziko, naturo, turismo, iomete pri erotiko, nacia kulturo, ktp. Mi volas interŝanĝi donacetojn kaj vizitojn.



*Dvoran Deák Ladislav,
Str. K. hájence nr. 6751A
CS-391 02 Sezimovo Ústí II.
Ĉeĥoslovakio*

Pli ol 100 gejunuloj (kelkaj 11-jaraj kaj pluraj 15-18 jaraj) volas korespondi individue aŭ kolektive kun ĉeĥoj, slovakoj, poloj, estonoj, finnoj kaj okcident-eŭropanoj. Adreso: Gimnazio Bányai Júlia, Esperanto-grupo, Nyíri u. 11., H-6000 Kecskemét, Hungario.

Mi deziras korespondi NUR pri varbado kaj propagando de esperanto - koni ĉiujn rimedojn. S-ro René Debernardi, 11 ave. Valdiletta, F-06100 Nice, Francio.

Koresponda Servo por Aŭstralio kaj Nov-Zelando:

**Aŭstria Esperanto-Asocio,
Betty Aulsebrook, 51 Lakewiew Crescent, Forster, NSW-2428.**

12-jara knabo, Tamás BRUNNER, Kandó K. u. 6., H-8500 Pápa, Hungario.

12-jara knabino, Annamária ÉDL, Liliom u. 2/5. H-8500 Pápa, Hungario.

14-jara knabino, Szilvia VASVÁRI, Anna tér 1. H-8500 Pápa, Hungario.

12-jara knabo, Zoltán PAP, Dózsa Gy. u. 38. H-8500 Pápa, Hungario.

12-jara knabino, Brigitta KOVÁCS, Budai Nagy A. u. 18/a. H-8500 Pápa, Hungario.

Lastminute

Aperis la ĉi-jara Pasporta Servo!

Fine de aprilo aperis la ĉi-jara eldono de Pasporta Servo (senpaga gastiga reto de esperantistoj). La listo enhavas preskaŭ 900 adresojn el 59 landoj (la antaŭaj necertaj adresoj ĉiuj estas forigitaj).

La listo estas mendebla ĉe UEA kontraŭ 18 guldenoj (kosto nur de 1 tranokto de okcidenta junular-gastejo) + ekspedo kosto.

Por havi la liston netranspagipovaj landoj havas specialajn rabatojn por limigita kvanto. Detalaj informoj ĉe landaj organizantoj, kaj ĉe la Landaj Sekcioj de TEJO.

Kotiztabelo (aliĝo ĝis 01.07.1992.)

Kat.	Loĝado en ...	Landoj X	Landoj Y
A.	● lignaj dometoj	6.500 Ft.	220 gld.
B.	● 2 lita ĉambro en hoteleto	11.000 Ft.	290 gld.
C.	● propra tendo	5.100 Ft.	170 gld.

Landoj X: Albanio, Bulgario, Ĉeĥolovakio, Hungario, landoj el eksa Jugoslavio, Litovio, Estonio, Latvio, Polio, Rumanio, landoj el eksa Sovetunio.

Landoj Y: ĉiuj aliaj landoj.

Rabatoj

- Kontribuantoj al la programo ricevas 5-10%-ojn de rabato! (-post anticipa konfirmo).
- Membroj de HEEJ ricevas 2000 Ft-ojn de rabato.

Krompagoj

- Aliĝintoj post 01.07.92. devas krompagi 500 Ft. resp. 30 gld. (landoj X, resp. Y).
- Tiuj aliĝintoj de IJS'89-91, kiuj SEN AVERTO (kaj sen pago) simple ne alvenis, krompagas 500 Ft-ojn.

Kondiĉoj

- Kiel aliĝdato validas la ricevo de la pago. (Por Hungario, Polio kaj landoj Y).
- Por aliĝantoj el la landoj X (escepte de Hungario kaj Polio) la aliĝdato estas la dato de la ricevo de la aliĝilo.
- Malaliĝi eblas ĝis 01.07.92.. Por ĝustatempaj malaliĝantoj ni resendas la pagitan kotizon minus 10%.
- Post 01.07.92. la kotizo ne estas repagebla, sed la aliĝo estas trasdonebla al alia persono per skriba atestilo de la originala aliĝinto.
- Pro teknikaj kialoj ni ne havas memzorgan kategorion.
- La partoprenkotizo ne inkluzivas la veturkoston de IJS al MEJS en Olomouc. Ĝi estas surloke aparte pagenda.
- Hungaroj pagu la partoprenkotizon al Hungara Junulara E-Asocio (konto: MIB 315-10976) aŭ rekte al LINGVO-Studio.
- Poloj pagu la kotizon (1.300.000 zł. por kategorio "A") per poŝtmandato al skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa.
- Por eventuala vojaĝsubvencio germanoj kaj italoj turnu sin al GEJ resp. IEJ.

Vian KOTIZON sendu al *Universala Esperanto-Asocio (UEA-ELLS-S, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)*, nepre indikante nian kodon *ELLS-S, IJS*.

Vian ALIĜILON sendu al:

LINGVO-STUDIO, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario.

Vian PROGRAM-proponon sendu al:

HEJ, Németh Csaba, H-9400 Sopron, Várfal u. 2.

“Juna estas tiu, kiu sentas sin tia...”

**03-09. en aŭgusto, 1992.
u. Esztergom, Hungario**



**Organizas: Hungara Esperanto-Junularo kaj
LINGVO®-Studio, Budapest**

La urbo Esztergom situas
nur je 180 km-oj de Vieno,
loko de la ĉi-jara Universala Kongreso...



**LINGVO-Studio Budapest, kaj
Hungara Esperanto-Junularo**

H-1675 Budapest, pk. 87. Telefono/fakso: +36-1-1288258

Salutojn!

Ĉu vi volas pasigi agrablan someran feriadon en internacia esperanto-
etoso? IJS estas por ebligi tion al Vi!

La ĉi-jaran aranĝon ni organizas denove apud la ĉarma urbeto Esztergom,
ĉ. 50 km-ojn nordokcidente de Budapeŝto, apud la rivero Danubo, en la
junulara centro de la pitoreska valo "Búbánatvölgy". Dum IJS por unu
semajno ni volas revivigi Esperantion. Ni volas, ki vi konatiĝu kun multaj
novaj homoj, kaj volas ebligi al vi renkonti la malnovajn amikojn. Dum
la semajno ni havas varian programon: ni havas E-konzertojn, kino- kaj
videofilmojn, plurajn sociajn ludojn kaj konkurson, kaj kompreneble prele-
gojn kaj diskutrondojn pri nia movado, pri ĝia historio kaj perspektivo. Ni
volas helpi al vi ankaŭ ekkoni la diversajn E-servojn, kaj ilian uz-manon.
Kompreneble ne mankos vesperaj diskotekoj, la tradicia balo, diversaj
ekskursoj, libroservo kaj ankaŭ la nokta babilejo kun bufedo...

Dum la semajno ni loĝos ĉu en lignaj dometoj (kun plurlitaj ĉambroj), ĉu
en la samloka hoteleto, ĉu en propraj tendoj.

Ni volas, ke dum IJS vi sentu veran internacian esperanto-etoson. **Pri la
aliĝoj, pagoj kaj teknikaj aferoj kontaktu LINGVO-Studio (1675 Budapest,
pk. 87.), pri la programo la estraranon de HEJ: Németh Csaba, H-9400
Sopron, Várful u. 2. Se post IJS vi partoprenos ankaŭ MEJS-on en Olomouc,
ni helpos al Vi veturi tien en komuna karavano. Do, pripensu kaj priparolu
la aferon ankaŭ kun viaj amikoj!**

Ĉu partopreni ĉi-jare IJS-n? Kial ne?! Bonvenon en Hungario!

Németh Csaba

Szilvási László

ALIĜILO AL IJS-92

Familia nomo VIRO/VIRINO

Persona nomo

Preciza poŝta adreso

Lando Telefono

Dezirata(j) kunloĝanto(j):

Vegetarano/nevegetarano Naskiĝdato:

Post IJS mi volas veturi al MEJS en Olomouc. Jes/Ne

Profesio, fako, ŝatokupo aŭ hobbio:

La partoprenkotizon mi pagis laŭ la loĝkategorio A / B / C

- al UEA en Rotterdam, favore al la kodo ELLS-S;
- al Budapest, favore al Hungara Esperanto-Junularo;
- al Budapest, favore al LINGVO-Studio;
- mi promesas pagi tuj post la alveno.

La sumo de mia pago

Partoprenkotizo:

Rabato:

Malrabato (krompago):

Entute:

Dato: Subskribo: